

Jen Bulteno/64

julio
aŭgusto
septembro
oktobro



JEN BULTENO ORGANO DE LA JUNULARO ESPERANTISTA DE NORD-AMERIKO
 julio-aŭgusto-septembro-oktobro 1964

Sendu kotizojn al: Stanley F. Cohen, 16 Long Avenue, Allston,
 Massachusetts 02134.

Sendu materialojn por la JEN-Bulteno portempe al Humphrey Tonkin,
 7 Linnaean St., Apt. 6, Cambridge, Mass. 02138.

Ĉi tiun numeron redaktis Humphrey Tonkin kaj Julie Crandall.
 Tajpis - Julie Crandall.

Estraro de JEN:

Ann Bodine Sekretario
 Stanley F. Cohen Kasisto
 Humphrey R. Tonkin Komisiito pri Eksterlandaj Aferoj.
 Jonathan R. Pool
 Robert Davis

Postenuloj de JEN:

Eileen Davis Sekretaria Helpanto
 Ruth Weissman Sekretaria Helpanto
 Joseph Chagnon Kasista Helpanto
 Joseph Horn Kasista Helpanto
 Gail Korb Kasista Helpanto
 John Kooistra Kasista Helpanto

Reprezentantoj al JEN:

Arthur Morse Okcidenta Massachusetts
 Naomi Sabghir Universitato de Maryland.

JEN petas ke ĉiu alia junulara Esperanto-grupo sur loka aŭ lerneja
 nivelo elektu unu el siaj membroj kiel oficialan reprezentanton al
 JEN. Sendu la nomon de la reprezentanto al la Sekretario.

WHAT'S HAPPENED TO JEN???????

JEN has been having problems. Not lack of members, so much as dis-
 organization. Since the May-June issue of the JEN Bulteno, the biggest,
 thickest and most imposing ever, JEN seems for a moment to have spent
 powers.

But while you have been shaking your head and wondering what has be-
 come of JEN, JEN has been gathering forces for a greater, more enthu-
 sastic and more successful year than we have ever had before.

1964 has seen new bursts of activity on many fronts in the US. Esper-
 to Information Center in New York has achieved new successes; the
 Toronto Education Center continues its work of providing the United
 States with good educational materials; at this year's International Youth
 Congress in Amsterdam there were more United States delegates than there
 ever been in the history of the Esperanto youth movement.

On a more mundane level, both ELNA and JEN are having problems of a
 purely organizational nature. Full-length courses in Esperanto on the
 radio, television programs, press successes -- these are the achievements
 of 1964. Failure to type labels, lack of promptness in replying to letters,
 confusion about who shall do what when -- these are the failures. With a
 little good sense, the failures can be eliminated: the successes are per-
 manent.

During the coming months JEN Bulteno will again be based on Cambridge.
 Will local groups volunteer to provide the material for specific issues?
 Will the Harvard group be flooded with articles, stories, letters, car-
 dinals? We hope so. Let the coming winter see fantastic new successes
 for JEN. We know we have the strength. All that matters is to get those
 things done on time!

KRITIKA STUDO DE "ORHARULINO KAJ LA TRI URSOJ"
Anthony Mancoske

La aŭtoro rekonis la bezonon pri serioza studo de la grandaj literaturaj verkoj de la nuna kaj pasinta tempo kaj do donas al la esperantistaro tiun ĉi komencan studon de la famkonata psikologia dramo, "Orharulino kaj la Tri Ursoj" (t.e. "Goldilocks and the Three Bears").


Unuavide, la rakonto "Orharulino kaj la Tri Ursoj" povas ŝajni naiiva kaj sensignifema kun malmulta aŭ neniu serioza enhavo; pli proksima esplorado, tamen, lumigas la fakton, ke l' aŭtoro de tiu ĉi simpla infanrakonto firme ekkomprenis la fundamenton de moderna Freŭda psikologio.

Eĉ surface, "Orharulino" elstaras el preskaŭ ĉiu alia historio kun kiu ĝi enklasiĝas, ĉar mankas la kutimaj tri mofoj de boneco super malboneco, de beleco super malbeleco, aŭ de malforteco super forteco. Sed tiu ĉi unikaĵo eble ne gvidas la leganton al la vera komplekso de l' historio.

La sciigo de la ekzisto kaj ekstensiva uzado de baza, sed malgraŭe signifplena, simbolismo tra la temo kaj agoj tiel gvidas la leganton ekzameni la psikologiajn elementojn implikitajn. Komprenigo de la simplaj domaj objektoj simbole uzitaj en la rakonto faras bazon por ekkapti la signifecon de la psikologia kaj environmenta evoluo de la ĉefa karakterino. Nia verkisto ne faris tion ĉi per diskutoj kaj priskriboj de la precipulino mense kaj emocie, sed pli per siaj reagoj al, kaj rilatoj kun, la menciitaj hejmaj objektoj. Tiu ĉi faktoroj rilate al la sekvontaj objektoj aparte devas konservi en la formigo de opiniopri la psiko de Orharulino kaj en la desegno de logika bildo pri ŝia familia vivo: a) la kalikoj de avenkaĉo; b) la seĝoj; c) la litoj.

a) La provo kaj manĝo de la avenkaĉo fariĝas la unua deziro de la junulino eniranta la domon de la urso familia.

(daŭrigo sur p. 7)



"Mi ne povas interrompi lin nun. Li argumentas
kun nederlandano pri la origino de Sankto Nikolao."

Unu el la plej fundamentaj kaj esencaj konceptoj de la lingvoscienco (aŭ lingvistiko) estas, ke lingvo estas sistemo de voĉaj simboloj, per kiuj homoj interkomunikas. En la latinidaj lingvoj la sama vorto--langue, france; lengua, hispane, lingua, itale (ankaŭ latine) signifas kaj 'lango' kaj 'lingvo'. Estas la sama afero pri la finna vorto kieli. La germana vorto Sprache havas klaran rilaton kun la verbo sprechen, kiu signifas 'paroli'. Ĉiu homo lernas paroli antaŭ ol lerni legi aŭ skribi, kaj multegaj homoj estas analfabetaj. (Kompreneble, estas kelkaj personoj, kiuj ne povas paroli, sed ĝenerale eĉ surdulo povas lerni paroli--kaj antaŭ ol skribi. Mi ne diskutas pri tio.) Fakte, estas ankoraŭ lingvoj, por kiuj oni ne havas skribsistemon, kvankam tiu afero ŝajnas esti rapide ŝanĝiganta.

La lingvo do estas unue parolsistemo kaj nur due skribsistemo. Sed tio ne estas memevidenta, precipe en ia kulturo kiel nia, kion Robert A. Hall, Jr. priskribas kiel "tro literema" ("over-literate"). En multaj lernejoj oni studas kaj la anglan lingvon kaj fremdajn lingvojn kvazaŭ ili estus ĉefe skrib kaj ortografisistemoj. Jen specifa ekzemplo: Vi, kiuj studis aŭ studas la francan: kiel oni faras plurajn de substantivo? Oni adicias -s?! Nur en la skribsistemo -- kaj franca infaneto ne konas tiun sistemon. La fakto estas, ke la plurala sufikso malaperis antaŭ pluraj jarcentoj. La sola diferenco inter "Voici le livre" (Jen la libro) kaj "Voici les livres" (Jen la libroj) estas la sono de la vokalo de la artikolo.

La franca kaj la angla ortografioj estas trege konservemaj. Antaŭ ne tro longe, antaŭ ol preskaŭ ĉiuj povis lerni legi kaj skribi, la ortografio estis nerigida. Eĉ William Shakespeare literumis ŝian propran nomon diversmaniere. Al multaj nuntempaj homoj, estas sendube malfacile kaj mirindege konstati, ke iu povis--iam--literumi pli-malpli laŭ sia propra volo. Tio estis ĉefe vera dum la Mezepoko. Kompreneble, la eklezianoj--ĝenerale, la solaj homoj kiaj sciis skribi--ofte uzis latinemajn literumaĵojn. La angla vorto doubt ('dubo', ankaŭ 'dubi') estis pruntvorto el la franca doute,

(daŭrigo de p. 4)

La unuan de ŝi provita ŝi decidus esti tro varma kaj tial ŝi rifuzas ĝin. Ĉar ŝi ankaŭ decidus ke tiu ĉi estas de la patro, rekta kunligo estas konstatebla inter la kaliko kaj la trajtoj asociitaj de ŝi pri ŝia patro, t.e. "varmeco" de animo, vireco, kaj emocia intensco.

La kalikon provitan sekve ŝi decidus esti de la patrino kaj ŝi trovas esti tro malvarma. Tiu ĉi malvarmeco povas signifi unu el du aferoj al Orharulino: malvarmeco koncerne al Orharulino mem, aŭ malvarmeco rilata al retiriĝo. Se tamen la malvarmo interpretiĝas plue esti la antonimo kaj do preciza malo de varmo, tiel laŭ Orharulino, la patrino eble ŝajnas esti la malo de la patro. Tial, la malvarmeco estas koncerna al la retiriĝo de la patrino for de sekso, la vivo, la edzo, kaj eble eĉ Orharulino mem. Estas do diveneble, ke, ĉar ŝi ne povas ami la patron (per ŝia malakcepto de lia kaliko) kaj al ŝi mankas la varmeco kaj sekureco de patrin-figuraĵo (per la netaŭgeco de ŝia kaliko), tiu ĉi transdonas al Orharulino sufiĉe da kialoj por forirado de la hejmo.

Ambaŭ tiuj ĉi alternativoj, kun kiuj ŝi identigas maturecon kaj plenkreskecon, ŝajnas netaŭgaj al ŝi. Tial sekvas ĝuste ke ŝi trovas la trian esti precize ĝusta. Per sia lasta selekto ŝi elektas simbole junulecon anstataŭ plen kreskeco.

(b) Ŝi elektas simile kaj konforme per la plenumo de la sekva fizika volo. La seĝoj de la patro kaj de la patrino estas respektive tro malmola kaj mola, kvankam tiu de la infano estas taŭga.

(c) La elekto pri litoj konformas al ŝia ĝenerala inklino, ĝisnune demonstraciita.

Povas notiĝi tie ĉi, ke, kvankam ŝi malakceptas maturecon, la reala juneco estas jam ne taŭga al ŝi. Tio ĉi montriĝas per la finfina manĝado de la kaĉo, la detruo de la seĝo, kaj la eltrovo ŝia en la lito, ĉiu de kiuj ne povas esti refarataj multe kiela al la juneco mem.

La signifeco de la seĝo eĉ vidiĝas pli profunda, ĉar pro ĝi oni povas esti infano, eĉ se multe ŝi tiel deziras, ĉar la iloj de infaneco ne plu taŭgas por ŝi. Do unuavide, la priskriboj de la ora hararo, la sola bildo desegnita per la aŭtoro pri la ĉefa karaktero, estas aplikeblaj al

(daŭrigo sur p. 11)

ESPERANTO-INFORM-CENTRO

Antaŭ kelkaj monatoj oni malfermis en Novjorko la Esperanto-Inform-Centron de E.L.N.A. (305 E. 40 st., New York, N.Y. 10016) por propagandi la Internacian Lingvon. Ties direktoro estas S-ro Bernhard Stollman, novjorka advokato, kiu multe laboras por Esperanto.

En la oficejo ankaŭ deoras S-ino Mary Murray kiu, kun sia edzo, translokiĝis el Kalifornio al Novjorko por dediĉi sian plenan tempon al la entrepreno.

La oficejo ricevas multajn informpetojn. Oni regule komunikas novaĵojn al la gazetaro. S-ro Stollman, krome, gvidas kursojn kaj prelegas al diversaj grupoj. Kiel prezidanto de la nova entrepreno „Esperanto-Disk“, li aranĝis la ĵus eldonitan gramofon-diskon „Ni Kantu en Esperanto“.

„Ni kantu en Esperanto“

33 1/3 rpm., longedaŭra, disko numero ESP-1001 estas la unua en serio eldonota sub la usona etikedo „Esperanto-Disk“. Profesie produktita, kun frapa kovrilo

kaj akompana libreto enhavanta ĉiujn tekstojn, la disko inkluzivas plurajn konatajn folklorajn kantojn, ekz. „Kara Kentoki-land“ kaj „Pasintaj Tagoj“, en gitar-akompanata plenumo de esperantisto Frans Jahger, kiu kantas ankaŭ la plej popularajn pure Esperanto-kanzonojn, kiel „La Lingvo por Ni“ kaj „Ĉiu, Ĉiu“.

Pluaj frandaĵoj en la kolekto estas Serca monologo de Duncan Charters, kiu parodias i.a. iom neinternaciajn parolmanierojn de la internacia lingvo; kaj drameca deklamacio de Julius Balbin, de „Dabij Jar“ (E. Jevtuŝenko), gajninta en la pasinta jaro la unuan premion de la branĉo tradukita poezio en la Belarta Konkurso.

La disko estas mendebla ĉe la kutimaj libro-servoj. Prezo: 4.95 usdol. aŭ 54 steloj + sendkostoj. Krome, ĉar la entrepreno „Esperanto-Disk“ kunlaboras kun la Esperanto-eldonejo de Nord-Ameriko, la disko estas ricevebla laŭ interkonsenta aranĝo interŝanĝe por Esperanto-materialoj uzablaj en Usono.

nova eklono FOTO - AGENDO

La libro por noti viajn ĉiutagajn memorendaĵojn, de sept. 1964 ĝis la fino de 1965, do por la tuta venonta jaro, 4 tagoj sur 1 paĝo (20 x 14 cm). Ĝin rice ilustras

fotoj (kun komentario) pri verkaj de junaj nederlandaj artistoj (grafiko, pentrarto, arkitekturo, ceramiko, plastiko, ktp.). Ĝi estas

BELEGA DONACO

por la jarfinaj festoj — aŭ jam nun, se eĉ por vi mem!

Prezo: 3,50 ned. guld. (14 steloj, 9 rkp.), pagotaj per intern. poŝtmandato aŭ poŝtgiro nederlanda 666965, je la nomo de „20-a I.J.K., Zaandam“. Eventuala profito estos por la esperantista junularo.

Eldono de: 20-a I. J. K., Kastelenstraat 231, Amsterdam, Nederlando.

JARO DE INTERNACIA KUNLABORADO (JIK)

Per sia Rezolucio de la 19-a de decembro 1962 la Ĝeneral Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj decidis proklami la jaron 1965 okaze de la 20-a datreveno de la fondiĝo de U.N. "Jaro de Internacia Kunlaborado".

La subskribinto opiniis, ke la jaro de Internacia Kunlaborado prezentigas ankaŭ kiel vere taŭga okazo por atentigi UN. kaj la Ŝtatojn-Membrojn pri la Internacia Lingvo, pri la rolo, kiun ĝi ludas sur la kampo de internacia kunlaboro kaj pri la signifo kiun ĝi povus havi en la proksima estonteco. Pri tio estis sendita la 21-an de februaro 1964 cirk. let. al ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj kaj al ĉiuj komitatanoj kaj observantoj de UEA.

Post la limdato venis ankoraŭ tiom da respondoj, ke la estraro havis sufiĉe klaran bildon pri la starpunkto de niaj organizaĵoj. Senescepte ĉiuj aprobis la proponon kaj promesis helpi.

La Estraro de UEA pritraktis plej atente la aferon en sia kunsido de la 22-a de marto. Konsiderante la amasan apogon al la ideo organizi apartan kampanjon okaze de la JIK, la Estraro unuanime decidis entrepreni la agadon. La Estraro aparte diskutis la demandon ĉu tiu agado inkluzivu ankaŭ taŭgan proponon al Unui ĝintaj Nacioj kun amaso da subskriboj favore al la Internacia Lingvo. Post longa diskutado ĝi decidis ke necesos entrepreni ankaŭ tiun paŝon.

Generala Plano

La plano antaŭvidas duoblan agadon: unuflanke, necesos kiel eble plej efike subteni klopodojn de U.N. por la JIK. kaj aliflanke, necesos paralele agi favore al la Internacia Lingvo.

La landaj asocioj povus organizi prelegojn pri U.N. en la lokaj grupoj, precipe okaze de la TAGO de U.N. en oktobro, kaj publikigi almenaŭ mallongajn artikolojn pri U.N. en la propraj organoj. Almenaŭ unu ero de la programo de la landaj kongresoj en 1965 devus esti dediĉita al U.N.

AGADO FAVORE AL ESPERANTO

UEA antaŭvidas plurajn paralelajn paŝojn por antaŭenigi la aferon de la Internacia Lingvo en la JIK. La kerno de la agado estos "Propono al U.N. Okaze de la Jaro de Internacia Kunlaborado." Ni ĉiuj devos klopodi havigi kiel eble plej multajn subskribojn de unuopuloj kaj organizaĵoj. Necesas tuj komenci la kolektadon de la subskriboj.

(daŭrigo sur p. 11)

(daŭrigo de p. 6)

kiu ne havis b--nek en la sono, nek eĉ en la ortografio. Sed iu konstatis, ke la vorto venis el latina dubium--do, oni enmetas la b--kaj forpreni ĝin neni--nu, preskaŭ neni--akceptus. La vorto debt ('ŝuldono') montras la saman aferon.

Neni skribsistemo de lingvo (mi ne diskutas pri fonetikaj sistemoj bazataj de lingvistoj) estas sufiĉe ĝusta. Sed estas klare, ke la ortografisistemoj de la finna, la hungara, la hispana, la germana, kaj multe aliaj estas multe pli bonaj ol la franca kaj angla sistemoj. La konsistemoj ŝanĝiĝas, sed la ortografio estas, kaj restas, tre konservema. Ekzemple, tiu aĉega gh de anglaj vortoj signas sonon, --la ĥ, --ki efektive ekzistas, sed kiu estas perdita (krome en kelkaj dialektoj, kiel en Skotlando). La germana vorto brachte ('alportis') ankoraŭ havas tiun konsonanton (ĝi estas unu konsonanto, kvankam oni skribas ĝin per du literoj); sed la angla brought, ne. Kaj en la franca lingvo oni havas multe de manieroj por literumi sonon, precipe vokalon--sed kompreneble oni ne plu povas elekti! Estas "malkorekte" skribi j'eme anstataŭ j'aime ('mi amas'--kaj la ai signas antikvan, perditan aj). Estas interese, ke nur en lingvo kun tia skribsistemo oni povas havi "okuldialekton", kiel skribas Hall. Tre nuntempa ekzemplo estas "The Beatles": la vorto sonas same kiel beetle, ('skarabo'), sed beat aldas al la ritmo de la muziko kaj tre eble ankaŭ al la ideo de beatnik, kiun mi tute ne povas traduki.

Ĉar lingvaj sistemoj ŝanĝiĝas, ortografioj malĝustigatas. Eĉ skribsistemoj kreitaj de lingvistoj por indiana lingvoj antaŭ cent jaroj ne plu reprezentas la prononcon, ĉar ili jam ŝanĝiĝas dum la pasintaj cent jaroj! Eble tiuj ŝanĝoj ne estas tro grandaj aŭ gravaj, sed la situacio povus malpliboniĝi. Kaj ju pli ĝi malpliboniĝas, des malpli oni povus korekti ĝin. Do, mi finas mian artikolon per demando: se la prononco de Esperanto ŝanĝiĝos, --kaj ĝi certe ŝanĝiĝos, se tre multe da homoj uzos ĝin: oni ne povas malebligi tion--ĉu oni bonvole--aŭ eĉ malbonvole--ŝanĝos la ortografion? Se ne, mi bedaŭras, ke la afero ĉe Esperanto povus iutage esti kiel tio ĉe la angla haoso.

(daŭrigo de p. 7)

pureco, virto, kaj naiveco; aferoj asociataj kun juneco.. Estas rimarkeble, tamen, ke la naiveco ne estas pro juneco, sed pro nescieco kaj timo, t.e. pro emocia nematureco.

Evidentiĝas do, ke tiu ĉi rakonto restas dum la jaroj, ĉar, spite de ĝiaj surface stultaj kaj sensencaj enhavoj, l'aŭtoro rekonis la problemojn de la familio kaj de la edukado de infanoj.

Eble eĉ ne estas senkaŭze diri, ke tiu ĉi komentanto pri la socio de la hieraŭo kaj la nuneco estis persono kun sciado egala al tiu de Freud mem.

(daŭrigo de p. 9)

UEA eldonis la foliojn parte nur kun la Esperantlingva teksto kaj parte kun apudaj tekstoj en tri el la 5 oficialaj lingvoj de U.N. nome aŭ la angla, aŭ la franca, aŭ la hispana.

En la nomo de la Estraro de UEA mi direktas al ĉiuj la plej varmajn bondezirojn por sukcesplena agado en la Jaro de Internacia Kunlaborado.

Kun estimo kaj koraj salutoj.

Revuo ESPERANTO

sincere via,
Prof. D-ro Ivo Lapenna

Ĉiujn ĝeneralajn komunikojn oni sendu al la sekretario--
F-ino Ann Bodine, 229 Sage Hall, Cornell University, Ithaca, New York.